

TAMEN ★ PLU!

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO MAJO 2006 / JARKOLEKTO 25

Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park. S.A. 5019 - esperantobob@iprimus.com.au

Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en SudaŬstralia: <http://sa.esperanto.org.au>

Vizitas eksterlandano Francujon. Du esperantistoj staras atendante aŭtobuson ĉe bushaltejo.

Diras la eksterlandano: Undskyld, taler I dansk?"

La esperantistoj nur gape rigardas lin.

Refoje provas la eksterlandano: Entschuldigung, "k6nnen Sie deutsch sprechen?"

La esperantistoj rigardas lin silente.

"Spreech U misschien Nederlands?"

La esperantistoj rigardas lin kun surprizo.

Nun provas la eksterlandano: Ursakta mig, men talar ni svenska?"

La esperantistoj nenion komprenas.

"Excuse me, but do you speak English?"

La esperantistoj daŭre mute rigardas lin.

Preskaŭ senespera provas la eksterlandano:

"Parlare Italiano?"

La esperantistoj ne respondas.

"Snakker I norsk?"

Nenia reago.

"Habla ustedes Espa6ol?"

La esperantistoj plu silentadas.

Skuas sian kapon la eksterlandano kaj foriras elreviĝinta.

Tiam diras la unua esperantisto al la alia: "Eble ankaŭ ni devus lerni almenaŭ unu fremdan lingvon!"

"Sed kial," diras la alia. "Tiu eksterlandano scipovas kaj parolas almenaŭ ok lingvojn, kaj li ne tre bone elturniĝis!"

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare uzadi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nuna, moderna jarmilo: "Lingvaj Resondoj".

Tiu ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitendas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$22,00.



Eta Petro kun sia patrino vizitas siajn geavojn. Tiuj loĝas en la kamparo.

"Hodiaŭ mi helpos Avon per la sternado de fekaĵo", diras Petro.

"Vi uzas la malĝustan vorton, la ĝusta vorto estas sterko", lin korektas lia patrino.

Elirante li sin turnas al sia patrino dirante: "Pardonu min, sed mi forgesis, kio estas la nova vorto por fekaĵo?"

Gravaj Esperanto-eventoj

Merkredon la 3an de majo en Clarence Park ekde la 18a horo parolos Ashley pri sia vivo.

Sabaton la 13an de majo, je la 17a horo, okazos Teatraĵa Vespero (ĉiu el ni prezentu ion) ĉe Pat Palmer, 4/28 Hampton Street North, Goodwood, S.A. 5034, telefono 8272 1515.

Merkredon la 17an de majo okazos bonega kunveno en Clarence Park ekde la 18a horo.

Merkredon la 17an de majo okazos bonega kunveno en Clarence Park.

Ĝuu du tagojn da Vintrokursaro de “Esperanto en Sudaŭstralio” ekde la 3a ĝis la 4a de junio en Hackham South Primary School!

La 91a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006 en belega Florenco, Italujo.

Sabaton la 24an de septembro ni ĉiuj ekskursos al Haveno Viktoro.

Dimanĉon la 15an de oktobro, je la 18a horo, okazos kantado, pian- kaj mandolin(banĝo)muziko ĉe Indrani, 1/20 Fletcher Street, Woodville North, S.A 5012, telefono 8268 4021.

La 22a Somerkursaro kaj Kongreso okazos en 2007 en Hobarto, Tasmanujo.

De la 4a ĝis la 11a de aŭgusto 2008 la U.K. okazos en la belega urbo, Jokohamo, Japanujo.

“Mia edzino diras, ke ŝi forlasos min, se mi ne ĉesos mian kegloludadon”.

“Mi bedaŭras tion, kamarado, estos tre malfacile por vi.”

“Jes, ŝi certe mankos al mi!”

Gordon Coleman

intervjuita de Katja

Gordon naskiĝis en 1949, en Londono, liaj gepatroj estas Jozefo kaj Filiso, kiuj eksgeedziĝis en 1960.

En 1982 Gordon venis al Adelajdo kun sia propra familio. En 1984 li ekstudis en la Universitato de Sudaŭstralio kaj kvar jarojn poste li ricevis diplomon pri kapablo instruadi, la tiel nomitan ‘Diploma of Teaching’ kaj pri edukado li diplomitiĝis kun bakalaŭro. Sed kion li faris antaŭe?

“En 1964 mi aliĝis al la brita armeo kaj fine mi iĝis membro de la Gvardio. Dum mia militservo mi vojaĝis al multaj landoj: Singapuro, Kimrujo kaj Skotlando, kie mi renkontis mian estontan edzinon Anna. Ni geedziĝis kvin semajnojn post nia unua renkontiĝo – antaŭ tridek ses jaroj.”

Anna estas nun beligistino. Ŝi kaj Gordon laboras ankaŭ por la bonfara organizo “Tutmanda Vizio” kaj mem

“adoptis” pere de ĝi du infanojn. Unu el ili, Sindi, estas zulu knabino el Sudafriko, kaj la alia estas knabo Trymore el la tribo Xhosa en Zimbabvo. La veraj posteuloj de Gordon estas du knaboj, el kiuj unu estas bakisto kaj la alia juristo kaj kapitano en la armeo. Krom tiuj, Gordon havas ankaŭ unu filinon. Liaj nepoj Jakob estas 11-jara kaj Aaron 9-jara. Grava membro de la familio estas la hundino Jaafaa, “granda sinjorino”.

Pri Esperanto Gordon la unuan fojon aŭdis iam en la 1960-aj jaroj. La temo restis netuŝita, sed ne forviŝita ĝis 2005. Tiam, veturigante sian aŭtomobilon, li aŭdis la radioelsendon, en kiu Gloria Bristow parolis pri la ĵus okazanta Somerkursaro en Adelajdo. Serĉo en la telefonlibro – tie sub la kapvorto *Esperanto* troviĝis la adreso de Max Wearing. Gordon ne hezitis, li venis kun Max al la Somerkursaro kaj de tiam lia esperantisteco ĉiam pli fortiĝas. Kun la helpo de Max li daŭre lernadas la lingvon, kiu estas lia unua fremda lingvo. En 2005 li vojaĝis al Usono por preni parton en la Nordamerika Somerkursaro, NASK. Gordon estas aktiva esperantisto: li informas pedagogiajn instancojn, eĉ la ministerion pri edukado, argumentas, varbas kaj mem instruas infanojn en la lernejo, kie li laboras.

Kio estas liaj ŝatokupoj? Krom Esperanto estas vojaĝado, komputilumado kaj legado de mormonaj historiaj libroj. Rilate la vojaĝojn li aldonas: “La venontan Kristnaskon mi kaj mia edzino intencas viziti Sindi kaj Trymore. Tio estos nia tria vizito al Sudafriko. Ni veturos ankaŭ al Zimbabvo, Svazilando, Lesoto kaj Bocvano. En Lesoto Anna kaj mi intencas provi rajdi sur poneoj.”

Kampano sendis sian filon al altlernejo. Post la finiĝo de la studado retrovenis la filo fanfaronante pri tio, kion li lernis en la altlernejo. Tio iritis liajn gepatrojn, kiuj tute ne sciis kion fari pri li. Lia patrino metis tri patkukojn antaŭ la filon.

“Sed, Panjo, kial vi bakis tiom da patkukoj?”

“Sed, filo, mi bakis ja nur tri!”

“Ne, estas naŭ, tion mi tuj pruvos per iom da filozofio. Kie estas tri estas ankaŭ du, kaj du plu tri estas kvin. Kie estas kvin estas ankaŭ kvar, kaj kvin plus kvar estas naŭ...”

Tio sufiĉis al la patro, kiu preskaŭ eksplodis:

“Nun prenas mi du patkukojn kaj Panjo unu, tiam vi povos satmanĝi per la ses, kiuj restos!”

Kajtotago en Semaphore

La 1an kaj 2an de aprilo estis kajtotagoj en Semaforo, unu el niaj plej vizitindaj antaŭurboj. Sabaton ĉio estis bonega, la vento blovis kaj la kajtoj flugis. Sed dimanĉon estis preskaŭ neniuj vento, eble nur venteto, kaj estis tro malfacile flugigi kajton. Tio estas bedaŭrinda, ĉar Kajta (pardonu, Katja), estis farinta belegan kajton kun la surskribo “Esperanto”, kaj bela vizaĝo de rideganta esperantisto.

Tamen, ni daŭrigu la informadon pri nia ekzisto, ĉu ne? Jen belega bildo pri nia granda tago ĉe la marbordo!



Jam longan tempon la pramo kuŝis senmove atendente ke malaperu la nebulo.

Unue la pasaĝeroj sukcesis reteni sian bonan humoron, sed tio, kiel ĉiam, ne daŭris longe.

Subite iu el la pasaĝeroj iris al la ŝipestro dirante: “Ĉu vi volas, ke mi instruu al vi, kiel manovrigi ŝipon? Tio ĉi ne estas nebulo, oni eĉ tre facile povas vidi la stelojn!”

“Jes, tion oni povas”, respondis la ŝipestro, sed ni ne iros al la steloj!”

Unua plene Esperantlingva humanista phpbb forumaro

La Esperanto-sekcio de kroata humanista asocio, Komunumo Humanitas <http://www.humanitas.hr> hieraŭ lanĉis la unuan plene esperantlingvan, senpagan kaj senreklaman phpbb forumaron por Esperantoparolantaj simpatiantoj de homaranismaj, humanismaj, mondcivitanismaj, mondfederaciismaj, unitarianaj-universalismaj, hilelismaj kaj parencideaj valoroj. En la forumo eblas krom diskutado, ankaŭ afiŝado de korespondproponoj, proponoj pri gastigado ktp. Ĉiuj klarigoj troveblas kaj legeblas en Esperanto laŭ la TTT-adreso: <http://www..humanitas.hr/forum>.

Malgranda Jonas kuniris kun sia patro al naĝadkonkuro. Aŭdiĝis voĉo en la plilaŭtaŭdigilo, “Jen sekvas cent metroj da mamnaĝado por virinoj.”

Demandis malgranda Jonas: “Paĉjo, ĉu ili ne rajtas uzadi siajn brakojn?”

Encikliko en Esperanto

En la venontaj tagoj en la eldonejo “Editio Ora et Laboro” aperos Esperanto-traduko de la encikliko “Deus caritas est” de papo Benedikto la Deksesa. La tradukon lingve reviziis pastoro Gerrit Berveling; pastro Bernhard Eichkorn; profesoro, doktoro Carlo Minnaja kaj Goncalo Neves. La tekston tradukis el la germana originalo la esperantologo kaj teologo Reinhard Hauptenthal. Mendojn oni povas direkti retroŝte al editioniltis@aol.com aŭ al la libroservo de UEA. La prezo de unu ekzemplero estas € 6,-. Vatikano eldonis la tekston en A, D, F, H, L, Po kaj Pt.

Iu sinjorino tre timema, per sia ombrelo montris al la busŝoforo : “Ĉu tiu ĉi estas “Zamenhofstrato?”

“Ne”, respondis la ŝoforo, tio ĉi estas mia ventro!”

Gajnis medalon la Esperanto-Centro de Torino

Okaze de la Vintraj Olimpikaj Ludoj en Torino, Torina Esperanto-Centro akiris la patronecon de la organiza komitato TOROC por la produktado de kompaktdisko pri Esperanto kaj la komunaj idealoj inter la lingvo kaj la olimpikaj ludoj. 800 diskojn oni disdonadas al ĵurnalistoj el la tuta mondo. Krome la Komunumo de Torino tradukis Esperantlingven broŝuron pri la olimpika urbo, kies titolo estas, laŭlitere, "Torino ĉiam moviĝanta". La kvarkolora broŝuro nuntempe disponeblas ĉe la olimpikaj kaj urbaj informbudoj.

Verdstela hotelo

En la bela urbo, Harbino, en Nordorienta Ĉinujo sin trovas Esperantista hejmo "Verdstela hotelo", kiun majstras la elstara Esperanto-instruistino, s-ino Chen Yafen. Ŝi havas multajn gelernantojn tie. Kvankam la hotelo ne estas tre granda kaj luksa, oni tamen sentas sin kvazaŭ hejme tie. Ankaŭ vi ĉiam bonvenas, kaj kiam vi venontan fojon iros al Ĉinujo bonestu viziti tiun hotelon. Pliajn informojn volonte donas yafen1960@yahoo.com.cn harbc@hotmail.com

"Nu, kiel plaĉis al vi la teatraĵo hieraŭ vespere?"

"Nu, legante la kritikon en la hodiaŭa taggazeto, mi komprenis, ke mi ne devus esti ĝuanta ĝin tiom, kiom mi fakte faris!"

Ankaŭ vian kotizon

Nun refoje estas tempo por pagi sian kotizon al "Esperanto en Sudaŭstralio", jam pagis la sekvantaj membroj:

Arturo kaj Libby; Audrey kaj Bob; Jennifer; Katja kaj Trevor; Helen kaj Sandor; Indrani kaj Pat Palmer.

Ordinara membro: \$30; familiaj membroj: \$35; pensiulo: \$20; familiaj pensiuloj: \$25 kaj gejunuloj po \$10.

Ankaŭ vian kotizon akceptos nia kasistino, Indrani!

Luj neniam lernas, aŭ eble ili ne volas lerni!. Kiel ekzemplon ni prenu la viron, kiu eniris en librovendejon, sin turnis al unu el la vendistoj dirante: "He, vi, senharulo, diru al mi, kie mi trovos la libron, "Kiel trovi amikojn por la tuta vivo!"

La dua kunveno en aprilo

montriĝis esti tre grandega ĝojo. Parolis la moŝtino, Annie rakontante al ni pri sia tuta vivo, kiu estis tre interese. Ne multaj homoj spertis tiom el nur unu vivo. Ne forgesu legu pri ĝi en venonta Tamen Plu!

Promenis junulo sur la strato. Li surhavis nur unu ŝuon. Afabla maljunulino diris al li: "Sed junulo, vi surhavas nur unu ŝuon, ĉu vi perdis la alian?"

"Ne, male", respondis la junulo, mi trovis nur la unu!"

En Svisujo universalaj lingvoj

La aktiva agado de la internacia movado planlingva en Svisujo jam de kelka tempo superis cent jarojn. Tiukonscie fortiĝis la deziro resumi kaj bilanci tiun longan periodon plenan je eventoj, sukcesoj kaj problemoj. SVISA ENCIKLOPEDIO PLANLINGVA aperos en majo 2006 sub redaktado de Andreas Künzli ĉe eldonejo CDELI kun ĉirkaŭ 1000 paĝoj. Subskripcia agado ĝis la 30a de aprilo 2006. Informoj: <http://www.plansprachen.ch/index.htm> - mendoj: info@osteuropa.ch

"Kio en la mondo estas tio, ĉu vi aĉetis lulseĝon?"

"Jes, laŭ la kuracisto mi bezonas ekzerci mian korpon!"